

Jarraportoj de Esperanto-USA

2021

**Preparita por la virtuala kongreso
junio 12 – junio 19, 2021**

**Esperanto-USA
91-J Auburn St #1248
Portland MA 04103**

tel: 510.653.0998

**eusa@esperanto-usa.org
www.esperanto-usa.org**

Table of Contents

Raporto de la Prezidanto de Esperanto USA Junio 2021.....	3
Nia Misia Deklaro.....	3
Our Mission Statement.....	3
Raporto pri la Centra Oficejo de Esperanto-USA.....	6
Raporto pri la fonduso Schulze.....	7
JARRAPORTO PRI LA 51A NORD-AMERIKA SOMERA KURSARO DE ESPERANTO (NASK) 2020.....	7
Raporto pri la Senpaga Perpoŝta Lecionaro 2020.....	8
Raporto pri la Membreca Komitato 2020.....	8
Raporto pri AAIE 2020.....	9
FINANCAJ DOKUMENTOJ.....	9

Nia Misia Deklaro

Esperanto USA estas senprofitcela organizaĵo, kiu kuraĝigas kaj fortigas la Esperanto-komunumon en Usono kaj ĝiaj teritorioj, per la faciligado de subteno kaj komunikado por lokaj grupoj kaj per la provizado de centralaj rimedoj por niaj membroj.

Our Mission Statement

Esperanto USA is a non-profit organization that encourages and strengthens the Esperanto community in the United States and its territories by facilitating support and communication for local groups and providing a centralized set of resources for our members.

Via Estraro

Via estraro meritas krediton por nia pliboniĝo kiel senprofita organizo kiu servas la membrojn.

La estraranoj ĉeestas la estrarajn kunsidojn, kiuj okazas ĉiumonate tra la jaro inter niaj landaj kongresoj. Preskaŭ ĉiu kunsido havas kvorumon, ebligante voĉdonadon pri kritikaj aferoj, antaŭenirante per aprobitaj mezuroj. Inter niaj monataj kunsidojn, ni komunikas per Slack kaj retmesaĝoj.

Finance, ni finis la jaron 2020 en bona stato sen perdi monon. Tamen la jaro 2021 kaj 2022 donas al ni pli grandan defiojn, kiujn ni cxiuj frontas. Ni bezonos mondonacojn por bone fini la jaron 2021 kaj ankaŭ en la jaro 2022. Kutime, senprofitcelaj organizoj ne povos daŭri sen mondonancoj, kaj ni estas tiel. Nia membrokvanto ne sufiĉas por subteni niajn elspezojn per nur la membro-kotizo.

Via estraro ĝis la fino de la kongreso 2021

Rimarku la datoj, kiam finiĝos la deĵorperiodo de ĉiu direktoro de Esperanto USA:

Prezidanto	Philip Dorcas (Filipo)	ĝis 2023
Vic-Prezidanto	Alex Miller	ĝis 2023
Kasisto	Jordon Kalilich	ĝis 2021
Sekretario	Charlotte Burton	ĝis 2022
Direktoro	Timothy Boronczyk	ĝis 2021
Direktoro	Hans Becklin	ĝis 2021
Direktoro	Paige Feldmann	ĝis 2020
Direktoro	Brian Harmon	ĝis 2022
Direktoro	Fred Meyer, III	ĝis 2022
Direktoro	Tim Rice	ĝis 2023

La Nova Estraro por 2021-2024

Se vi estas membro de Esperanto USA, vi ricevis la balotilon kaj espere voĉdonis. Ni anoncos la rezultojn dum la Landa Kongreso de 2021. Dankon por partopreni en la grandaj decidoj elekti la estraranojn.

La Novaj Komunumaj Grupoj

Ni starigos novan projekton por la movado en Usono. Grupoj nun organiziĝas de la amikoj, kiuj havas la samajn interesojn, samajn hobiajn. Same kiel lokaj grupoj, ĉi tiuj grupoj ne estas formala parto de Esperanto USA, sed EUSA donos informon pri ili, kiu estras, kiun vi povos kontakti, ktp. Ĉi grupoj povas temi pri blinduloj, amatora radio, religio, politico, ŝakludo, ktp. Ĉi tiu grupoj rajtas mem-organiziĝi kaj doni la informon al EUSA por ebla apero en nia retejo.

La grupoj ne ricevos subtenon de Esperanto USA, pro tio, ke EUSA estas oficiala eduka organizo. Ni restos neŭtrala laŭ nia statuto kaj nia stato kiel senprofitcela organizo kun la IRS.

LK 2022

Nia Landa Kongreso en 2022 okazos en Montrealo, kie ni kunkongresos kun UEA. Tio ne estos nur por vi partopreni, sed ankaŭ por vi helpi. Ni, la Usonaj Samideanoj, kune organizos kiel eble plej multe por provizi la Universalan Kongreson kune kun la LKK de Montrealo.

Legu plu pri la UK de 2022 ĉe: <https://esperanto2022.ca>.

Rimarku, ke ĉi tiu Universala Kongreso **NE ESTOS VIRTUALA EVENTO!** Planu nun partopreni! La grandega evento de UEA ne ofte okazas en NordAmeriko. Ĝi estas la ŝanco por ni ĉiuj iri, kunlabori, helpi, lerni, kaj certe ĝui la kongreson. Ni ĉiuj renkontos novajn amikoj. Por ni, kiuj jam aktivis en la movado kelkajn jarojn, ni vidos niajn amikojn de aliaj lokoj, aliaj landoj. Ni salutos, ridos, brakumos unu la alian. Venu kun ni al Montrealo en 2022!

Zorgu pri la informo ce la retejoj, kaj nepre legu plu en la venontaj numeroj de Usona Esperantisto.

Ĉu vi jam havas vian pasporton? Pritraktu ĝin, ĝisdatigu ĝin nun!

Se vi volas partopreni, kaj eĉ volas helpi, nepre kontaktu nin en la estraro de Esperanto USA, aŭ membro de la LKK por la UK. Vidu la kontaktinformon en la retejo ĉe: <https://esperanto2022.ca/eo/kontaktoj/>.

Nia Bulteno

Hoss Firooznia estas nia redaktoro por *Usona Esperantisto*, nia oficiala informbulteno. Ĝi fidele aperas ĉiujn du monatojn kaj enhavas niajn novaĵojn kaj intersajn artikolojn. Dankon al Hoss pro lia daŭra laboro pri nia komunikilo.

Sed, ne nur tio... Nun, nia **tuta arkivo** haveblas en nia retejo! Hoss laboris multege por skani kaj provizi la multegajn bultenojn ne nur de Esperanto USA / ELNA, sed ankaŭ de EANA, la antaŭa landa organizo por Esperanto en Usono. Temas pri la jaroj 1906 ĝis 2020! Vidu la arkivon ĉe: <https://esperanto-usa.org/bulteno/arhivo/eo>. Kaj, la arkivo estas serĉebla!

Nia Retejo

Hoss Firooznia ankaŭ zorgas pri nia retejo ĉe <https://esperanto-usa.org/eo>. Dankon, Hoss! Nia estrarano Tim Boronczyk laboras pri kiel plibonigi la retejon.

Kio mankas en nia retejo aŭ retbutiko? Bonvolu komuniki kun membro de la estraro se vi havas sugestojn.

Reklama Komitato

Jordon Kalilich prizorgas nian kontrakton kaj efikecon kun la Donacio por Google Reklamado (“Google Ad Grants”) kaj raportas ĉiumonate al la estraro. Dankon Jordon!

Alex Miller prizorgas la reklaman teamon. Se vi sekvas al Esperanto USA per Facebook, YouTube, aŭ diversaj mas-komunikiloj, vi jam scias pri nia tre sukcesa konkurso, la Usona Bona Film-Festivalo. (The “American Good Film Festival”.) Ĝi sukcesis tiel multe, ke ni faras ĝin denove.

Ni ankaŭ esploras pri aliaj konkursoj. Se vi havas ideojn pri konkursoj aŭ similaj projektoj por la movado en Usono, bonvolu kontakti membron de la estraro.

Membreca Komitato

La membreca komitato prigrivas Tim Boronczyk. Nia membrakvanto restas stabile de monato al monato, kutime ĉe 530 membroj. Nia agado temas pri la tri tri batalfrontoj:

1. Varbado – Akiri novajn membrojn en kunlaboro kun la Reklamada Komitato.
2. Retenu – Zorgi pri niaj membroj. Ĉi tiu inkluzivas helpi la lokajn grupojn servi al la membroj.
3. Reakiri – Trovi la membrojn, kiu ne plu remembriĝas, komuniki kun ili, kaj klopodi kompreni kial ili ne plu volas esti membro de Esperanto USA. Jordon Kalilich kaj Nikvo Woods instigas nian planon verki leterojn al tiuj antaŭaj membroj.

La Nova Teamo, la Teknologia Gildo de Esperanto USA

Pro la pli vasta uzado de iloj por komuniki per la interreto, kaj pro la nova teknologio kiu pli kaj pli rapide progresas, ni anoncas novan teamon por la movado en Usono. Tio estas la Teknologia Gildo de EUSA (“The Technology Guild of Esperanto USA”). Estras la gildon nia estrarano Timothy Boronczyk.

Se vi volas helpi en tiu projekto kaj havas sperton, bonvolu sendi mesaĝon al Tim.

La Valoro de Via Membreco Kreskas

Pro pli ofta komunikado kun nia membroj, pro la pli ampleksa bulteno *Usona Esperantisto*, pro la pli aktivaj grupoj de regionaj kunordigantoj, pro la sukcesa konkurso La Usona Bona Film-Festivalo, pro la plano re-eldoni la membroliston surpapere, pro la pli aktivaj teamoj, pro la informo pri la novaj komunumaj grupoj, kaj pro la nova teknologia gildo, vi kaj viaj amikoj havas pli grandajn kialojn membriĝi, remembriĝi, esti aktivaj, kaj partopreni viajn Esperantajn eventojn. Vi havas motivon subteni al Esperanto USA per via bonkoraj mondonacoj. Bonvolu iri al nia retbutiko ĉe “donacoj”, aŭ klaku ĉe <https://tinyurl.com/4sh6ahtj>.

Volontuloj

Por ĉio, kion ni strebos fari, ni bezonos volontuloj. Kiel vi povos helpi? Kio estas via sperto? Kio estas via kapablo. Pli grave, kio estas via deziro, via vizio pro pli bona mondo? Je kiu fronto vi batalu? Ni volas pli da homforto por komuniki kun aliaj, cerbumi pri niaj defioj, por kunlabori en komitatoj, por antgaŭeniĝi en la Esperanta komunumo. Ni kunlabors kun UEA, USEJ, TEJO, AAIE, ILEI, ESF, kaj aliaj organizoj.

Amike raportas filipo, Phil Dorcas, prezidanto de Esperanto USA.

Raporto pri la Centra Oficejo de Esperanto-USA

La Centra Oficejo funkcias normale. Centoj de libroj ankoraŭ estas haveblaj en la reta libroservo, kaj membroj ankoraŭ ricevas rabatojn kontraŭ la prezoj. La C. O. estos preta pritrakti mendoj por la UK 2022 en Montrealo.

La C.O. respondas al demandoj kiuj venas telefone, perpoŝte, retmesaĝe, kaj per la formularo en la retejo. Kiam venas peto por informo de iu, kiu interesiĝas pri Esperanto aŭ pri la plej proksima loka grupoj, la C.O. plenumas la peton kaj ankaŭ plusendas la informon de la informpetinto al la plej proksima loka grupo kaj al la regiona kunordiganto de tiu grupo. Tiu system por la inforpetintoj funkcias bone, kaj kelkaj lokaj grupoj nun havas novajn membrojn pro tiu sistemo.

La C.O. helpas la kasiston prepari finanĉan informon, kaj eldonas ĝin en ĉi tiu jarraporto. La C.O. prizorgas la ĉiujara voĉdonado de Esperanto-USA, kaj raportas la rezultojn al la prezidanto.

Raportas Vilĉjo Harris, Direktoro de la Centra Oficejo, en la ŝtato Maino.

Raporto pri la fonduso Schulze

La fonduso Schulze provizas finanĉan subtenon por projektoj, kiuj instruas aŭ edukas Esperanton. En 2020 ne venis peton por finanĉa subteno.

Derek Roff, Komitatestro de la Schulze Komitato.

JARRAPORTO PRI LA 51A NORD-AMERIKA SOMERA KURSARO DE ESPERANTO (NASK) 2020

La origanala plano por la 51a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) estis okazigi ĝin por la sepa fojo ĉe Universitato William Peace en Raleigh, Norda Karolino. Ĉio komenciĝis bone kaj ni jam enregistris 50 studentojn kiam la mondpandemio de Kovid-19 nuligis niajn planojn.

Por la unua fojo, NASK estis tute per la interreto. La partoprenantoj uzis la sistemon “Zoom” kiu ebligas vivan, realtempan interagon kun instruisto kaj la studentoj. Estis 3 niveloj de instruado en 10 tagoj. La instruteamo estis Duncan Charters en la supera kurso, Thomas Alexander en la du meznivelaj kursoj kaj Hans Becklin en la du post-komencantaj niveloj. Entute 158 studentoj partoprenis.

Pro la fakto ke la pandemio daŭris kaj homoj devis resti hejme, la NASK teamo kaj ESF ofertis duan kursaron en la aŭtuno de 2020. Tim Morley el Britio gvidis “B2-Babiligan kurson” kaj Jose Antonio Vergara el Ĉilio prezentis la temon, “La fenomeno Esperanto: kiun/kian mondon ni eniris?” 32 studentoj ricevis 15 horojn da instruado dum du semajnfinoj: de la 28a septembro ĝis la 2a oktobro kaj de la 5a ĝis la 9a de oktobro.

Alia kurso okazis en la printempo de 2021. Christophe Chazarein-Bréa el Francujo instruis “Kiam Pentrarto Renkoniĝas kun Esperanto. 15 studentoj ricevis 16 horojn da instruado dum la kvar semajnfinoj en marto.

La Fonduso “Schulze Education Endowment” de la Esperantic Studies Foundation (ESF) finance subtenis la tutajn programojn, kaj efektive ĉiu partoprenanto ricevis iom da subvencia helpo. 12 el la kursanoj ricevis aldonan subvencian helpon el la NASKE-Fonduso de Esperanto-USA kiu valoris \$451. La NASKE-Fonduso de Esperanto-USA estas longdaŭra fonduso kreita por helpi Esperanto-lernantojn studi ĉe NASK.

La NASKa teamo multe laboris por sukcesigi la nekutiman programaron. Nuntempe en tiu teamo aktivas: Lee Miller (Teksaso), Derek Roth (Nova Meksiko), Chuck Mays (Norda Karolino) kaj Hoss Firooznia (Novjorko). Alia interreta NASK okazos somere en 2021 kun la espero ke ni revenos al ĉeesta NASK en 2022.

Ellen M. Eddy
Administranto NASK
La 6an de junio 2021

Raporto pri la Senpaga Perpoŝta Lecionaro 2020

Inter 1 januaro kaj 31decembro 2020, 25 novaj studentoj komencis la lecionaron (44 en 2019). El tio 3 estas en malliberejoj (7 en 2019). Tiujn nomojn mi sendis al la C.O. por aldono al la listo de informpetantoj. Dum la sama periodo 3 ricevis diplomojn (8 en 2019). 2 estis en malliberejoj (4 en 2019).

Ellen M. Eddy, Administranto

Raporto pri la Membreca Komitato 2020

The committee consists of: Tim Boronczyk, Chairperson (a Board member), Fred Myers (a Board member), Jordon Kalilich (Board Treasurer), Murray Merner (past Board Treasurer). The Membership Committee had its first meeting on Nov 14, 2019 - so most of our activity took place in the last half of FY 2021.

The major emphasis has been defining our goals. The core basics of the committee are:

Recruit (getting new members)

Actions included: updating E-USA brochures, identifying sources of potential members has been discussed. The \$5.00 Introductory Membership was discussed regarding its success of attracting new members as well as the other membership tiers.

Retain (provide the membership a continuous reason to be a member)

Actions included: An Internet program being designed to send out attractive birthday cards. The E-USA website design in general and the Retatiko in particular were discussed. The return of the Member List was discussed and proposed to the Board. A letter to encourage the use of Amazon Smile has been published in the *Usona Esperantisto* and a member survey has been suggested.

Retrieve (efforts to reengage members who have not renewed).

Actions included: developing a systematic procedure for sending out revised renewal encouragement letters.

Each of these tasks took a lot of research and development time. We have seen the need for volunteers to do the computer programming.

Murray Merner, Membership Committee

Raporto pri AAIE 2020

Pro la pandemio, AAIE ne estis aktiva dum 2020.

Vi povas rigardi informon pri ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) ĉe:
<http://www.ilei.info/>

Vi povas aliĝi al ILEI per la retbutiko de Esperanto-USA.

Vilĉjo Harris
Prezidanto, AAIE

FINANCAJ DOKUMENTOJ

Esperanto-USA
Statement of Activities
Calendar year 2020 and Comparative 2019

	Total 2019	Unrestricted 2020	Restricted 2020	Int Only 2020	Total 2020
Contributions (Note 1)	\$66,774	\$32,551	\$10,307	\$-	\$42,858
Annual Dues	16,171	14,170			14,170
Net Catalog and Subscription Sales (Note 2)	(2,939)	570			570
Net UEA Membership/Services	2,455	(85)			(85)
Net Convention Income	5,809	(76)			(76)
Net Investment Income	23,597	7,450	8,636	-	16,086
Net Correspondence Course Income	-	-			-
Misc. Income	5	-			-
Total revenues, gains, and other support	\$111,871	\$54,579	\$18,943	\$-	\$73,522
Esperanto Courses & Educ. Expenses (Note 3)	\$27,054	\$500	\$2,839		\$3,339
Educational Video Expenses	10,050	-	500		500
Publication and Publishing Expenses	3,289	1,712			1,712
Expenses of Promoting Esperanto (Note 4)	3,945	204	3,057		3,260
Membership Maintenance Expenses	1,885	1,645			1,645
Management and General Expenses(Unallocated)					
Salaries & Related (Note 5)	31,616	31,630			31,630
Rent & Utilities (Note 6)	2,954	3,650			3,650
Office and Misc. (Note 7)	4,094	3,294			3,294
Total expenses	\$84,886	\$42,636	\$6,396	\$-	\$49,032
Net Gain/(Loss)	\$26,984	\$11,943	\$12,547	\$0	\$24,491
YTD Equity at the beginning of the year		\$67,869	\$90,055	\$194,196	\$352,121
Adjustments (Note 8):		(3,735)	-	-	-
This year's total gains and losses		11,943	12,547	-	24,491
Total Equity YTD		\$76,077	\$102,602	\$194,196	\$376,611

1 - Includes all fund contributions, plus Friends of Esperanto Dues, less new Life Memberships, plus in-kind donations

2 - Includes sales and related expenses of all physical wares, UEA memberships, and magazines

3 - Includes NASKE Expenses, CATW Expenses, Schulze Expenses, and Goldman Expenses

4 - Includes Expenses of Wolff Fund, Harlow Fund, Glenn Fund, and Marketing Expenses

5 - Includes Salaries, Payroll Taxes

6 - Includes Rent, Utilities, Telephone/Fax, Internet Access, Office Insurance

7 - Includes Payroll Fees, Office Postage and Expenses, Small Equipment Purchases

 Licenses/Permits/Taxes, Bank Charges, Liability Insurance and Miscellaneous Expenses

8 - write off Accounts Receivable prior to 2000

Esperanto-USA Statement of Financial Position As of Year End 2020

	Dec 31, 2019	Dec 31, 2020		Dec 31, 2019	Dec 31, 2020
ASSETS					
Current Assets					
Cash/Checking/Savings					
11100 · Petty Cash	\$100	\$100		\$-	\$284
11300 · Undeposited Funds	8	262		-	-
11400 · Checking, Comm Bank	13,002	25,353		-	-
11450 · Money Market, Comm Bank	-	-		-	-
11460 · PayPal	17,597	4,309		3,703	1,064
Total Cash/Checking/Savings	\$30,707	\$30,025		195	245
Other Current Assets					
11475 · UEA konto	\$8,002.09	\$(1,380)		17,049	15,344
11500 · Credit Card Payments	-	-		9,358	6,986
12200 · Accounts Receivable	72	(244)		\$30,305	\$23,924
Total Other Current Assets	\$8,074	\$(1,624)		\$27,777	\$28,809
Other Assets					
11600 · Investments	\$352,468	\$383,554		\$27,777	\$28,809
11800 · Land, El Paso	1,121	1,121		\$27,777	\$28,809
12400 · Book Service Inventory	12,422	10,857			
12500 · Prepaid Expenses	749	749			
11900 · Items Donated	4,662	4,662			
Total Other Assets	\$371,422	\$400,944			
TOTAL ASSETS	\$410,203	\$429,344			
LIABILITIES & EQUITY					
Liabilities					
Current Liabilities					
21100 · Accounts Payable				-	-
21400 · Sales Tax Payable				-	-
21700 · A/P Subscriptions				-	-
21800 · A/P UEA				-	-
22599 · Outstanding Payables				3,703	1,064
22500 · Gift Certificate Payable				195	245
22650 · Deferred Income				17,049	15,344
22900 · E-USA kontoj				9,358	6,986
Total Current Liabilities				\$30,305	\$23,924
Long-Term Liabilities					
22700 · Life Memb.				\$27,777	\$28,809
Total Long-Term Liabilities				\$27,777	\$28,809
Total Liabilities					
				\$58,083	\$52,733
Equity					
39100 · Unrestricted Net Assets				\$67,869	\$78,102
39200 · Temporarily Restricted				90,055	104,313
39300 · Permanently Restricted				194,196	194,196
Total Equity				\$352,121	\$376,611
TOTAL LIABILITIES & EQUITY	\$410,203	\$429,344			

2020 Statement of Fund Activity - Year End

	Beginning Balance	Donations Received	Expenses	Transfers	Balance Before Inv./Inc.	Investment Income	Adjusted Ending Balance
Unrestricted Funds							
* General	\$(59,843.59)	\$25,624.69	\$41,088.67	\$17,168.40	\$(58,139.17)	\$5,122.65	\$(53,016.52)
* Gibson Endowment	27,960.27	440.00	-	-	28,400.27	-	28,400.27
* H.E. Reed Education	-	-	-	-	-	-	-
* Life Membership	48,691.14	3,200.00	-	(2,168.40)	49,722.74	-	49,722.74
* Glenny	3,748.95	60.00	-	-	3,808.95	-	3,808.95
* Unrestricted Publi	18,424.80	-	-	-	18,424.80	-	18,424.80
Goldman Education	31,164.32	6,426.00	500.00	-	37,090.32	2,325.10	39,415.42
Total Unrestricted	\$70,145.89	\$35,750.69	\$41,588.67	\$15,000.00	\$79,307.91	\$7,447.74	\$86,755.65
Restricted Funds							
Restricted Publi	\$4,089.36	\$456.20	\$-	\$-	\$4,545.56	\$1,505.48	\$6,051.04
NASKE	14,165.16	5,285.00	412.50	-	19,037.66	1,012.56	20,050.22
Educational Video	7,281.38	-	500.00	-	6,781.38	288.77	7,070.15
Schulze Education	48,809.21	-	200.00	-	48,609.21	4,683.21	53,292.42
CATW Education	1,698.52	1,150.00	-	-	2,848.52	348.97	3,197.49
Wolff Publicity	3,506.07	-	-	-	3,506.07	474.13	3,980.20
Don Harlow Literati	2,006.93	-	-	-	2,006.93	87.86	2,094.79
777 Fund	937.04	2,916.00	2,856.72	-	996.32	(8.98)	987.34
Amikeco Translime	882.08	-	-	-	882.08	38.61	920.69
Festoj	4,749.90	-	-	-	4,749.90	207.93	4,957.83
Total Temp. Res	\$88,125.65	\$9,807.20	\$3,969.22	\$-	\$93,963.63	\$8,638.55	\$102,602.18
Interest-Only (Permanently Restricted) Funds							
Massey	\$70,805.34	\$-	\$-	\$-	70,805.34	\$-	\$70,805.34
Thomas A Goldmai	17,133.00	-	-	-	17,133.00	-	17,133.00
Ellen Lewis	4,655.01	-	-	-	4,655.01	-	4,655.01
Catherine & Willian	58,445.83	-	-	-	58,445.83	-	58,445.83
Wolff Endowment	7,324.72	-	-	-	7,324.72	-	7,324.72
Children Around th	5,832.52	-	-	-	5,832.52	-	5,832.52
Publishing Endowm	30,000.00	-	-	-	30,000.00	-	30,000.00
Total Perm. Res	\$194,196.42	\$-	\$-	\$-	\$194,196.42	\$-	\$194,196.42
Total of all Funds	\$352,467.96	\$45,557.89	\$45,557.89	\$15,000.00	\$367,467.96	\$16,086.29	\$383,554.25

2020 Statement of Fund Activity - Year End

NOTES:

General Fund Donations reflect contributions to General Fund and Friends of Esperanto Dues
 General Fund Expenses reflect adjustment to balance receipts and expenditures
 Life Membership Transfers reflect annual amortization of Life Memberships at 7% to Annual Dues
 Restricted Publishing transfers reflect allocation of 50% of E-USA published gain
 Income allocation is shown in the Fund Descriptions document available in the E-USA website
 \$15,000 transferred from the CO to the General Fund

Net Investment Income Includes:	
Interest/Dividend Income	\$8,042.25
Gains/(Losses) Realized	\$(144.00)
Unrealized Gains (Losses)	\$8,203.04
Expenses:Svc Chgs	\$(15.00)
Net Investment Income	\$16,086.29